

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGEBLAS ĈIUTAGE

Numero 87, Septembro 2025



La eksa aviadila kontrolturo en Torslanda.

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

Enhavo.....	2
Pri Ora Ĵurnalo.....	2
Espeporko meditas.....	3
La Librorondo havis la unuan kunvenon de la aŭtuno	3
Saliko – Raita Pyhälä – forpasis la 20an de aŭgusto, <i>Soile Lingman</i>	4
Saliko – Raita Pyhälä – lĉrare och esperantist 1939–2025, <i>Soile Lingman</i>	4
Saliko – Raita Pyhälä – ofte sendis artikolojn al Ora Ĵurnalo	5
Ĉu vi konas ĉi tiun babilejon?.....	6
Marso – Martin Moreno – el Hispanio, trajnvagis en norda Eŭropo.....	7

Terpomfesto kaj renkonto en mia nova loĝejo en Alingsås.....	8
La origino de homa lingvo, <i>Bo Sandelin</i>	11
Satiro pri la kunveno de Trump kaj Putin en Alasko, <i>Walter Klag</i>	12
Atakoj de Rusio 1919 – 2022	13
Pri la ukraina poeto Jarina Ĉornohuz, <i>Petro Palyvoda</i>	14
Klakfermilo Koh-i-noor (KIN), <i>Josef Křĩř</i>	15
Aviadila vojaĝo, <i>Lasse Granat</i>	20
bLINKEN	22
Metodo solvi problemojn, <i>Jan Bondesson</i>	23
Nerveco, <i>A. Ĉĥov</i>	24



Pri la frontbildo: La aerodromo okcidente en Torslanda en la insulo Hisingen, 15 km de Gotenburgo, establita en 1923, estis la flughaveno de Gotenburgo ĝis 1977, kiam ĝi estis anstataŭigita de la flughaveno de Landvetter, 25 km de Gotenburgo. Origine la flughaveno ankaŭ estis marflughaveno. La nova loĝkvartalo Amhult nun troviĝas sur la malnovaj alteriĝaj areoj. La kontrolturo restas kiel memoraĵo kaj estas uzata por festoj ktp.

La unua aviadila flugado en Gotenburgo okazis ĉe la regimento Kviberg en 31 majo 1911 kun la belga aviadisto René Cozic de Ostende. La unua vera flughaveno de Gotenburgo estis establita en aŭgusto 1913 en aero en Tingstad, sude en Hisingen. La unua salto per paraŝuto en la urbo okazis 1 julio 1920 kun la sveda leŭtenanto Thörnblad.

(El Wikipedia)

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com. Fina paĝarangō: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Ora Ĵurnalo n-ro 87 ankaŭ troviĝas en versio por poŝtelefono ĉe www.esperanto-gbg.org/87



Espeporko meditas



- ◆ Mankas al ni **Saliko – Raita Pyhälä** el Finnlando, kiu forpasis la 20:an de aŭgusto. Ĉirkaŭ 30 fojoj ŝi kontribuis artikolojn al Ora Ĵurnalo, je diversaj longecoj, sed ĉiam kun belaj bildoj. Ŝi ankaŭ vizitis la gotenburĝan Esperantoklubon kaj tranoktis en mia hejmo. Ŝi aktivis en Esperantujo preskaŭ ĝis sia lasta elspiro. Soile Lingman – multjara amikino de Saliko – skribas pri ŝi en ĉi tiu numero.
- ◆ **Marso**, juna hispano, vizitis Gotenburĝon dum sia rondiro per trajno en nordiaj landoj. La 12a de aŭgusto ni renkontis lin en la Lingvokafejo en Esperantoplatsen. Li doktoriĝis pri kiel oni per bakterioj povas ekstrakti metalojn el minejaj restaĵoj. La fako vere interesis la gotenburĝanojn.
- ◆ Oni nomas Alingsås:on "la terpomurbo". Ĉiun jaron la urbo aranĝas la **Terpomfestivalon** – kutime en junio, sed ĉi-jare en aŭgusto. Mi invitis klubanojn de Gotenburgo spekti artekspozicion en

la biblioteko, sperti la festivalon kaj viziti min por vidi kiel funkcias kompakta vivado. La vetero estis favora kaj ni povis sidi sur la altano.


- ◆ **Bo Sandelin** skribas pri la origino de homa lingvo – ĉiam interesa temo!
- ◆ Petro Palyvoda el Ukraino prezentas poemon de ukraina poeto, **Jarina Ĉornohuz**, kion li tradukis en Esperanton. Malgraŭ la milito la literatura arto floras – aŭ dank' al ĝi?
- ◆ Rusio atakis aliajn landojn 19 fojojn ekde 1919 ĝis 2022. En la ombro de milito satiro abundas – Pri Trump kaj Putin temas **satiro** trovita de Walter Klag.
- ◆ Invento, kiu igas la ĉiutagan vivon pli komforta, estas ja la **Klakfermilo**, priskribita de Josef Kříž.
- ◆ Pri **problemsolvo** Jan Bondesson cerbumas, kaj trovis "praktikan solvon".
- ◆ Ĝis oktobro! /Siv

La Librorondo havis la unuan kunvenon de la aŭtuno

La librorondo daŭrigas nun kun nova libro, **Anna de verdaj gabloj**. La 31:an de aŭgusto ni estis sep personoj, el ili du novaj, unu el Finnlando kaj la alia el Nederlando. Montriĝis, ke troviĝas pluraj diskuttemoj en la libro.

Se ĉiu partoprenanto kunportos unu aŭ du diskuttemojn – bonegas!

La romano temas pri la vivo de juna orfino, Anne Shirley, en Insulo de Princo Eduardo. La libro furore sukcesis, kaj la aŭtorino L.L. Montgomery, Kanado, poste verkis ĉ. 20 aliajn romanojn, el kiuj ok daŭrigis la historion de Anna. /Siv



Saliko – Raita Pyhälä – forpasis la 20an de aŭgusto

Soile Lingman, longdaŭra amikino de Saliko, sendis la jenan artikolon pri ŝi.



Saliko en restoracio Kappeli, Helsinko, somere 2024.

Saliko – Raita Pyhälä – instruistino kaj esperantistino 1939–2025

Nia kara amikino Saliko el Finnlando ne plu vivas. Ŝia filino Kaisa informis min, ke Saliko mortis 20.8 en kancero. La diagnozon ŝi ricevis nur post reveno hejmen de BET en Kaunas. Antaŭ tio ŝi ne sciis pri la malsano, sentis sin nur tre laca. Tamen ŝi volis partopreni en BET kiel kutime.

Saliko estis mia sola amikino, kun kiu mi povis paroli jen en la finna lingvo, jen en esperanto.

Tiuj du lingvoj estis tre karaj por mi dum la tuta vivo. Mi tre bedaŭras la forpason de Saliko. Mi memoras ŝin kiel mian karan finnan amikinin kaj esperantistinin.

En Esperantujo oni memoros Salikon kiel interesan kaj spertan preleganton.

Mi planis inviti Salikon al Stokholmo en oktobro por prelegi pri BET en nia Esperantoklubo.

Saliko – Raita Pyhälä – lärare och esperantist 1939–2025

Min vän Saliko är borta. Hon avled den 20.8 efter att ha fått diagnosen cancer i bukspottskörteln. Strax innan hade hon kommit hem från BET i Kaunas. Vi hade hoppats kunna inbjuda Saliko till Stockholm även i år för att höra henne föreläsa om BET. Därför blev budskapet om hennes bortgång en chockartad upplevelse.

Saliko blev aktiv esperantist på 1990-talet. Hon var till yrket språklärare liksom hennes man som gick bort för flera år sedan. De träffades under studietiden på universitetet i Helsingfors. Saliko efterlämnar en dotter och två söner samt ett barnbarn. Två systrar finns också kvar som hade kontakt med Saliko.

Saliko är vida känd inom Esperantokretsar där man kommer att minnas henne som en intressant person och erfaren föreläsare. För mig var hon en finsk vän som jag kunde tala

Komence de la somero ni kune planis renkontiĝi en Helsinki por festi mian 90an naskiĝtagon en majo 2026. Tion ni farus en Kappeli, kie ni kafumis pasintan someron dum mia unutaga vizito.

Soile Lingman

med både på finska och esperanto. Jag känner en stor saknad efter henne.

Soile Lingman

Saliko – Raita Pyhälä – ofte sendis artikolojn al Ora Ĵurnalo

Andreas listigis la numerojn de Ora Ĵurnalo kun kontribuaĵoj de Saliko:

n-ro 12, 13, 19, 31, 35, 38, 40, 42, 47, 48, 52, 53, 57, 62, 63, 67, 68, 70, 71, 72, 75, 77, 78, 79, 80, 81, 82, 83, 84, 85.

Jes, ŝi ofte beligis Ora Ĵurnalon per interesaj artikoloj kun belaj bildoj. Ŝi havis multajn talentojn kaj la temoj variis.

Povis temi pri la finna kulturo...

ekzemple en n:o 84 pri ***laponia pentristo Reidar Sörestöniemo***, n:o 72: ***finna arkitekto Alvar Aalto***, n:o 38: ***Nemateria kultura mondheredaĵo*** kaj en n:o 70 pri ***Johan Ludvig Runeberg***.



En la nacia parko Pyhä-Luosto.

Pri la naturo

Ekzemple n:o 52 pri ***Nacia parko Pyhä-Luosto***, norde de la arkta cirklo.

N:o 47: ***Vintraj bildoj el Finnlando***, n:o 42: ***Mezsomera festo sur insulo Sarvasalö***, n:o 82: ***La plej maljuna junipero en la mondo***, n:o 75 ***Lilioj kaj aliaj floroj***, n:o 77: ***Aŭtunaj tagoj en Savonio*** (Savolax).

Pri Esperantujo kaj pri lingvoj

Ekzemple n:o 53: ***BET 56 en Litovio***, n:o 62: ***BET 57 en Latvio***, n:o 32: ***Pri lingvoj parolataj en Finnlando***, n:o 13: ***Respondo al demandoj pri la vortoj lapono kaj sameo***.

Pri malsanoj

Ekzemple n:o 48: ***Kio okazis en la cerbo dr Karlo*** (pri demento), n:o 78: ***Artikolo pri aŭtismo*** en Helsingin Sanomat (kiam ni legis pri aŭtisma knabo en la librorondo).

Dialogo kun Domo de Raita Pyhälä, Finnlando

Estis printempo.
Malantaŭ altaj
malhelverdaj piceoj kaj
floranta siringoheĝo
mi subite ekvidis helan
lignan domon, kiu
ŝajnis iom dormema
kaj ne prizorgata. La
fenestroj de la
verando blinkis al mi:
Ni konatiĝu! Envenu!
Sur la tegola tegmento



*Ŝaltu min, ĝi flustris
sopirante lumon. Vi
vidos pliajn pordojn.*

Mi malfermis unu el ili
kaj trovis min en
kuirejo.

*Ho kiel bone ke finfine
iu envenas, salutis min
nigra fornelo, per kies
fajro oni iam kuiris. De
longe mankas al mi*

Plej populara artiklo tamen estis en n:o 12:
Dialogo kun domo. Pluraj personoj diris ke la
etoso estas mirinda kaj pro la teksto, kaj pro
la bildoj.

Mi ankaŭ trovis en n:o 63: **Ĉarma Lovisa** kaj
n:o 79 **Laponia trolparo**, ambaŭ interesaj
ekzemploj pri la imagkapablo de Saliko.

Mi estas danka ke mi havis la eblecon
konatiĝi kun Saliko, varma, interesa persono.
Foje ŝi kaj Soile loĝis ĉe mi, post renkonto kun
esperantistoj en Trädgårdsföreningen,
Gotenburgo. Estis malvarmaj ventoj. Sed ene
en la restoracio estis varme kaj ankaŭ en la
Palmodomo kompreneble varmis. Tamen la
impresoj estis multaj, kaj kiam mi kondukis la
aŭton al Gråbo, en la malantaŭa benko kaj
Soile kaj Saliko trankvile dormis.

La sekvan tagon ambaŭ estis viglaj kaj en
Redbergsskolan Saliko prelegis pri BET 67.

Mi volus ke vi, Saliko, sendus artikolon pri la
vivo en via nova mondo, sed bedaŭrinde la
ligilo inter la du mondoj ne ebligas ŝin plu
kontribui al Ora Ĵurnalo. Ŝi mankas al mi.

/ Siv



Finna babilejo

ESPERANTLINGVAJ

artikoloj en Esperanto

Ĉu vi konas ĉi tiun babilejon?

Inga Johanson sendis sugeston pri reta babilejo el Finnlando
kun interesaj artikoloj, ekzemple **Geometria meznombro de
orta triangulo, Imposta juro**: Imposto estas tre ofte uzata
vorto, sed kiel oni difinas imposton?, **Ĉu vi konas la keĉuan?**

La retadreso de **Finna babilejo**:

<https://finnababilejo.fi/kategorioj/artikoloj/esperantlingvaj/>

Marso – Martin Moreno – el Hispanio, trajnvagis en norda Eŭropo

La 27an de aŭgusto li sendis la jenan leteron al Ora Ĵurnalo:

Saluton!

Mi estas Marso (Martin en la hispana), esperantisto el Hispanio! Mi faras trajnvojaĝon tra la baltaj landoj.

Mi komencis en Norvegio, vizitante Bergen kaj Oslon, poste trairis Svedion, vizitante Gotenburgon kaj Stokholmon. Poste mi prenis pramon al Helsinko, Finnlando, kie mi ankaŭ vizitis Turku kaj Tampere.

Mi prenis alian pramon al Talino, Estonio. Mi ankaŭ vizitis Pärnu kaj Tartu.

Mi skribas ĉi tiun mallongan artikolon sur trajno al Rigo, Latvio. Mi ankaŭ vizitos Litovion. Mi povas vojaĝi tiom multe danke al mia Interrail-bileto, kiu permesas al mi preni trajnojn en Eŭropo. Dum la vojaĝo, mi vizitas esperantistajn grupojn en kelkaj urboj.

En Gotenburgo mi estis invitita al lunĉo, kaj ni parolis pri mia laboro. Mi estas mikrobiologia sciencisto ĉe la Universitato de Seviljo, kaj mi kunlaboras kun minindustrioj por uzi bakteriojn por ekstrakti metalojn el mineraloj.

En Stokholmo mi estis invitita al posttagmezo de ludado de la ukulelo.

En Helsinko ni renkontiĝis ĉe la biblioteko. En Turku, mi ricevis urbogvidadon, kaj en Tampere, ni tagmanĝis kaj grimpis turon por vidi la urbon de supre.

Sciante Esperanton estas avantaĝo dum vojaĝado. Oni povas renkonti tiom da homoj en ĉiu urbo. Multan dankon al ĉiuj esperantistoj, kiuj bonvenigis min! Mi esperas vidi vin baldaŭ en Hispanio!

/ Marso



Post la renkonto en Esperantoplatsen en 12 aŭgusto, Roger gvidis Marson en la centro de Gotenburgo. Unue ili iris al Trädgårdsföreningen, La Ĝarden-asocio, kie oni havas i.a. grandan terenon kun nur rozoj. Poste ili trairis Drottningtorget (La Reĝina placo) kaj promenis laŭlonge de la Avenuo ĝis Götaplatsen. En la mezo de Götaplatsen staras granda statuo de Pozidono, la mardio. La vetero estis bonega kaj ili sidis admirante la statuon kaj la urban vivadon.

Ĉe la placo de Linné la vagado finiĝis ĉe la hotelo de Marso. Roger rimarkis ke Marso interesiĝis pri la tekstoj sur ŝildoj. Certe li lernis kelkajn svedajn vortojn dum la promeno. Bonvenon denove, Marso, por daŭrigi la lernadon! ☺

Roger retumis al mi pri la vesperaj agoj. Mi ja nur ĉeestis en Esperantoplatsen. / Siv



Magnus, Roger, Kurt kaj Marso en Språkcaféet (Lingvokafejo) ĉe la Esperantoplaco, Gotenburgo. Ankaŭ Andreas ĉeestis, sed li devis foriri pli frue. Mi, Siv, fotis.

Terpomfesto kaj renkonto en mia nova loĝejo en Alingsås




Jen ekster la stacidomo ni rigardas la statuon *La virino kun la mansako*, per kiu ŝi batas la kapon de naziisto en Växjö. Pri la statuo vi povas legi en numero 54 de Ora Ĵurnalo.

23 aŭgusto. Fotoj: Ingegerd Granat. Teksto: Siv.



***"La sinjorino kun la mansako"** – la gazetfotisto Hans Runesson faris la foton dum manifestacio en aprilo 1985 en la urbo Växjö. La bildo montras flagportantan manifestacianton de NRP, naziista partio. De malantaŭe 38-jara virino per sia mansako batas la naziiston kontraŭ lia kapo.*

*La bildo inspiris la skulptistinon Susanna Arwin (naskita 1959) fari skulpturon en du ekzempleroj. La alia troviĝas en la urbo Varberg. La statuon Susanna nomis **"Mansako kiel armilo"**.*



Ni startis la rondiron vizitante artan ekspozicion en la Kulturdomo. Ĉiu loĝanto en Alingsås, kiu volis, povis montri sian bildon aŭ skulptaĵon dum la somero. Malgraŭ ke la plejparto estis amatoroj, la ekspozicio estis interesa. Eĉ lernejklasoj partoprenis. La temo: Sonĝoj – Koŝmaroj.

En la Kulturdomo troviĝas la urba biblioteko. Ni parolis kun bibliotekisto pri esperantolibroj. Troviĝas malmultaj, ĉar neniu demandas ĉu troviĝas tiaj. Ni revenos kun broŝuroj kaj kelkaj libroj.

Pro la varmeĝo kaj la homamaso sur la Granda Placo, ni nur duonhoron restis tie por vidi la Terpomfestivalon.

La bildo montras parton de la Granda Placo kun la busto de la plej konata viro en Alingsås, Jonas Alströmer, kiu dum la 18a jarcento komencis kultivi terpomojn sur sia





El Stokholmo venis Soile Lingman ...

bieno Nollhaga, ĉar mankis terpomoj al liaj holandanaj laboristoj en la teksejo. Por fari brandon oni uzis grenojn, sed pli kaj pli terpomojn. Tial oni povis baki pli el la greno, post tiam kiam Eva de la Gardie inventis metodon fari brandon el terpomoj. Do, oni povas diri ke dank' al brando la terpomoj populariĝis. ☺

La urbon Alingsås oni ankaŭ nomas la kafeja urbo. Kiam virinoj komencis labori en la teksindustrio, mankis al ili tempo por baki. Kafejoj kaj bakejoj aperis en la urbo. Foje oni nuntempe aranĝas kafejrondirojn. Ĉe *Nollhaga slott* sur la dua etaĝo estas nun ekspozicio pri la kafejkulturo. Vidinda!

En mia nova loĝejo nun regas "kompakta vivado". Dank' al la bela vetero oni povis sidi kaj ene kaj sur la altano.



... kaj Agneta Järlström.



Mi vere ŝatas mian novan loĝejon malgraŭ ke ĝi estas nur triono de mia antaŭa loĝejo. Mi bedaŭras ke esperantoklubo ne troviĝas en Alingsås. Iam ekzistis tia.

Fine oni iris al la Nollhaga palaco. En la proksimeco estas eksperimenta ĝardeno, kie



oni provas kultivi sur malsimilaj grundoj. En parto estas apartaj floroj, kiu logas papiliojn.

La trajno al Gotenburgo iris senĝene, ĉar ne estis traklaboroj ĉi-sabate.

/ Siv, Lövskogsgatan 5, Alingsås



La origino de homa lingvo

svedlingva libro eldonita en 2019. La gazeto Svenska Dagbladet opinias:
Populärvetenskap av högsta klass! Populara scienco de la plej alta klaso!

Bo Sandelin, Gotenburgo, rekomendas ĝin:

Kiel kaj kiam estiĝis homa lingvo? Tiu demando estas la temo de la, por ĉiu lingvointeresito, tre leginda popularscienca libro *På spaning efter språkets ursprung* (Serĉante la originon de la lingvo) de Sverker Johansson. Survoje al hipoteza respondo, Johansson unue instruas pri la ĝeneralaj ecoj de lingvoj kaj aliaj manieroj komunikiĝi. Grava estas ankaŭ la historio de la evoluo de diversaj homenoj. Tiu historio multe klariĝis en la lastaj jardekoj, danke al granda progreso en, interalie, la sciencaj metodoj studi genetikajn ecojn en fosiliaj trovaĵoj.

Fundamenta estas evolubiologia perspektivo, laŭ kiu mutacioj, kiuj estas favoraj por vivado, tendencas resti. Multe da spaco estas uzata por diskuti la biologiajn kaj sociajn ŝanĝojn, kiuj kondukis al plena lingvo. Eble, sed ne certe, pralingvo estis parolata de *Homo erectus* en orienta Afriko jam "antaŭ 1,8 milionoj da jaroj" (p. 360). *Homo neandertalensis*, kiu aperis antaŭ eble 400 000 jaroj, probable povis paroli. Tiu specio, kiu ial formortis, tiom similis al la verŝajne iom pli juna sed parte samtempe kaj ankoraŭ vivanta *Homo sapiens*, ke individuoj el la du specioj povis havi komunan infanon, kaj "hodiaŭ ĉiuj homoj kun radikoj ekster Afriko havas kelkajn procentojn da neandertalgenoj en sia DNA" (p. 306).

Prijuĝante la parolkapablon, oni konsideris ne nur korpajn detalojn, sed ankaŭ tiajn aferojn kiel la gradon de komplikeco kaj la bezonon de kunlaboro pri diversaj atingiĝoj. Ju pli komplika kaj kunlaborbezona ia afero estis, des pli probable estas ke tiuj, kiuj okupiĝis pri ĝi, povis interparoli.



Esperanto ne estas forgesita. Johansson konstatas, ke ĝi estas la plej konata el tiuj lingvoj, kiuj havas identigeblan kreinton, kaj kiuj estis kreataj "por fariĝi internacia helplingvo por faciligi por homoj kun malsamaj gepatraj lingvoj komunikiĝi. Ili diferencas plurmaniere de ordinara parolataj lingvoj, ĉefe ĉar ili estas konscie dezajnitaj kun facilaj reguloj por facile lerni" (p. 143).

Cetere, esperanto havas denaskulojn, "infanojn, kiuj elkreskis en hejmoj, kie ambaŭ gepatroj parolis esperanton inter si. Tiuj infanoj lernis esperanton en la sama maniero, kiel aliaj infanoj lernis ordinara lingvojn, kaj tio funkciis bonege. Oni ne rimarkis ion rimarkindan en la evoluo de la lingvo de tiuj infanoj. Tio signifas, ke la homa lingvokapablo estas tute taŭga por trakti artefaritajn lingvojn" (p. 143).

Bo Sandelin

Satiro pri la kunveno de Trump kaj Putin en Alasko

Walter Klag sendis ĉi tiun videon...



<https://www.youtube.com/watch?v=J5Tz296Kqxo>

*Kiu estos la estonteco por Ukrainio? Humuro estas
speco de armilo – uzata por elteni la realon. /Siv*

Alaska 2025, en la germana

Ein unbekannter Ort in Alaska, 2025.

Links steht **Donald** mit einem Whiskyglas in der Hand, rechts **Wladimir** mit einem Wodkaglas in der Hand.

D: Hallo, Wladimir, bester Freund!

W: Hallo, Donald, bester Freund!

D: Gut schaust Du aus, voller Kraft!

W: Auch Du, sehr gut!

D: Ich habe Dir was mitgebracht.

W: Da bin ich aber gespannt.

D: Ein Viertel von der Ukraine. Schenke ich Dir.

W: Sehr großzügig. Aber eigentlich wollte ich die ganze Ukraine.

Alasko 2025, en Esperanto

Nekonata loko en Alasko, 2025.

Maldekstre estas **Donaldo** kun glaso da viskio en la mano, dekstre estas **Vladimiro** kun glaso da vodko en la mano.

D: Saluton, Vladimiro, plej bona amiko!

V: Saluton, Donaldo, plej bona amiko!

D: Vi aspektas bone, plena de energio!

V: Vi ankaŭ, tre bone!

D: Mi alportis al vi ion.

V: Mi estas vere ekscitita.

D: Kvaronon de Ukrainio. Mi donacas tion al vi.

V: Tre malavare. Sed mi volas la tutan Ukrainion.

D: Nächstes Jahr kriegst Du noch ein Viertel,
und so weiter. Nach vier Jahren hast Du
alles.

W: Eigentlich war die Ukraine immer
Russland. Schon unter Jekaterina.

D: Kata was?

W: Stoßen wir an!

(Gläser klingen)

W: Aber wie kann ich mich re-revanchieren?

D: Ich wollte schon seit langem Ka-kanada
und Grönland.

W: Aber klar. Da-das schenke ich Di-dir.

D: Was wird denn di-dieser Gouverneur
sagen? Dieser Trüdinger. Ist der noch?

W: Das kriegen wi-wir schon hin. Und die Dä-
dänen sind weit. Und di-dieser Selenskij –
der kann eh Ru-russisch.

(Gläser klingen)

D und W singen:

Ein Freund, ein guter Freund,
das ist das Beste, was es gibt auf der Welt.
Ein Freund bleibt immer Freund,
auch wenn die ganze Welt zusammenfällt.
Dum sei auch nie betrübt,
wenn dein Schatz dich nicht mehr liebt.
Ein Freund, ein guter Freund,
das ist der größte Schatz, den's gibt.

Alasko Monato

D: Venontjare vi ricevos alian kvaronon, kaj
tiel plu. Post kvar jaroj vi havos ĉion.

V: Fakte Ukrainio ĉiam estis Rusio. Jam sub
Jekaterina la Granda.

D: Kato kiu?

V: Ni levu la glasojn!

(La glasoj tintas)

V: Sed ki-kiel mi povas re-reciproke danki?

D: Mi delonge mi vo-volas havi Ka-kanadon
kaj Gro-gronlandon.

V: Ko-kompreneble. Mi do-donacos ĝin al vi.

D: Ki-kion diros la gugu-berniestro de
Kanado? Tiu Trudinger. Ĉu li an-ankoraŭ
deĵoras?

V: Ni traktos. Kaj la da-danoj estas
malproksime. Kaj tiu Zelenskij – li ja scipo-
povas paroli la rusan.

(La glasoj tintas)

D kaj V kantas:

Amiko, bona amiko,
tio estas la plej bona afero en la mondo.
Amiko ĉiam restas amiko,
eĉ se la tuta mondo disfalas.
Do neniam estu malĝoja,
se via koramikino ne plu amas vin.
Amiko, bona amiko,
tio estas la plej granda trezoro.

Walter Klag

<https://www.youtube.com/watch?v=J5Tz296Kqxo>

Atakoj de Rusio 1919 – 2022 (El Fejsbuko)



1917 – Rusio atakas Ukrainion

1920 – Rusio atakas Pollandon

1920 – Rusio atakas Azerbajĝanon

1921 – Rusio atakas Armenion

1921 – Rusio atakas Kartvelion

1939 – Sovetunio atakas Pollandon





1939 – Sovetunio atakas Finnlandon

1940 – Sovetunio atakas baltajn landojn

1956 – Sovetunio atakas Hungarion

1968 – Sovetunio atakas Ĉeĥoslovakion



1979 – Sovetio atakas Afganion

1992 – Rusio atakas Kartvelion

1994 – Rusio atakas Ĉeĉenion

1999 – Rusio atakas Ĉeĉenion

2008 – Rusio atakas Kartvelion

2014 – Rusio atakas Ukrainion

2015 – Rusio atakas Sirion

2022 – Rusio atakas Ukrainion

???? – Rusio atakos ???? / Siv



Pri la ukraina poeto Jarina Ĉornohuz

Petro Palyvoda skribis: Eble por vi kaj por via revuo estos interesaj poemoj de Jarina Ĉornohuz, naskita en 1995, kiujn mi elukrainigis.



Petro Palyvoda, estas ukraina kaj esperanta poeto kaj tradukisto en Kievo. Li verkis en la ukraina, la rusa, la germana lingvoj kaj originale en Esperanto kaj tradukoj aperis en pluraj ĵurnaloj, revuoj, almanakoj, antologioj.

Jarina Ĉornohuz

la poezio de nia epoko
estas mistero perdinta la rimon
perdinta la ritmon
scianta ke nur la sango rimas
kun ĉio
se iam vi tenis ĝin en la manoj
la poezio de nia epoko
estas nudigita senco el la baroka epoko
ruĝnigra laŭ koloro
kurbiĝita
en la formo de milita rondo

la tempo kiun ni travivis estas alia dimensio
kiel plenskribita per infanaj manoj
kajero en la ĉeleto



vi havas dudek du
 ne jarojn
 sed cirklojn sur spiralo
 viaj okuloj ĉesis vidi sonĝojn el libroj
 la miaj estas en la sango de la patrino
 kiam en la profundo de la grundo forbrulas
 per blua fuelo
 la tero de la kupra epoko
 mi iras al vi tra
 pecegoj frakasitaj de glacimontoj
 tiu kiu ankoraŭ ne naskiĝis
 sed estos via

[rekono]

kiam mi demandis la ĉielon pri vi
 demando estis malnova kaj simpla
 ĉu ni restos kune? –
 al mi aperis karto
 kun kandelo en la nokta mallumo

se tio ne estus vi
 mi eble estingiĝus
 pro la signo de la preĝeja silento de morto,
 kiun signas kandelo por ĉiuj soldatoj

sed tio estis vi –
 kaj mia koro varmiĝis
 ĉar mi sciis ke tiu karto
 estas la sola kandelo kiu lumigas
 vian domon en la montoj

la domon inter la montoj
 kien kondukas vojo tra step' kaj marbordoj,
 tra minejoj kaj grenadfuneloj

sola kandelo ĉe la fenestro de via domo
 atendas nin reveni de la milito,
 en la domo inter la montoj,
 kandelo signifas hejmon de ĉiuj loĝejoj

finfine
 mi rekonis vin inter milionoj da homoj

Klakfermilo Koh-i-noor (KIN)

de Hynek Puc (Putz) & Jindřich (Heinrich) Waldes,
 estas rezulto danke al ilia brila ideo.

Laŭ retaj informoj kompilis kaj esperantigis **Josef Kříž**, panglotia@gmail.com, Ĉeĥa respubliko.



Hynek Puc (1856-1938)



Klakfermiloj (rembutonoj) KIN



Heinrich Waldes (1876-1941)

Ilia prembutono estas malgranda metala
 klakfermilo konsistanta el du partoj, uzata
 por rapide kunigi du pecojn de materialo,
 kutime teksaĵoj.

Prembutonoj konsistas el kapo kaj bazo, kiuj
 estas alkudritaj aŭ nititaj sur la materialon,
 kiun ni volas kunigi.

Kiel ĉio komenciĝis?

En 1900, mekanikisto Hynek Puc (1856–1938)
 fondis sian propran laborejon en Prago por la
 produktado de breto-etikedoj, metalaj
 streĉiloj kaj kristnaskaj ornamaĵoj. En julio
 1902, li komencis kunlabori kun Heinrich

Waldes (1876–1941) kaj ili kune fondis firmaon nomitan "Publika Entrepeno por la Produktado de Malgrandaj Metalaj Varoj WALDES", registrita en la Komerca Registro la 9-an de julio 1902.

La firmao produktis malgrandajn metalajn objektojn. En la metiejo laboris unu laboristo kaj unu metilernanto. Tiutempe, tria komerca partnero, Eduard Merzinger (1872–1932), aliĝis al la firmao, kiu antaŭe gajnis rimarkindan monsumon en la loterio kaj volis investi 20 000 aŭstrajn kronojn en la novan entreprenon.

La frato de Waldes, Sigmund (1877–1961) – aliĝis al la firmao kiel la kvara akciulo komisiita per la funkcio de prokuroro. La brilan karieron de la firmao supozeble komencis unu el la dungitinoj, kiu sugestis, ke ili inventu kaj komencu produkti facile fermeblan agrafon, kiu ne gratas la ŝtofon. Ili transprenis ŝian peton kaj sukcesis – rezulto

estis la konata agrafo, kiun Waldes nomis kaj patentis sub la nomo KOH-I-NOOR.

En 1903, la pensema Hynek Puc konstruis la tiel nomatan enmetilon de fermiloj, kiu estis aparato, kiu anstataŭigis la antaŭan manan muntadon de la prembutonoj per pinĉilo. La pinĉilo estis anstataŭigita per mekanika risort-enmeto en la flekseblan parton de la stifto. Antaŭ tio, ĉi tio estis la laboro por dek spertaj laboristoj. Tio logike ebligis pliigitan produktadon, do la firmao komencis provizi ne nur la enlandan merkaton, sed ankaŭ eksportis prembutonojn eksterlanden. La produktado pliiĝis tiel, ke nur tri jarojn post la komenco de la produktado de prembutonoj, la ekzistantaj instalaĵoj ne plu sufiĉis. Tial, la produktado estis translokigita al nova konstruaĵo konstruita en la alia praga urbokvartalo Vršovice en aprilo 1907 (bildigita en la mezo).



Reklamafiŝo



Fabriko Koh-i-noor en praga urbokvartalo Vršovice



Reklamafiŝo.

Tiu ĉi fabriko fariĝis la plej granda de sia speco en la tiama Aŭstrio-Hungario, kaj la nombro de ĝiaj dungitoj pliiĝis: dume en 1903 tie laboris 300 homoj, post 1907 ilia nombro duobliĝis, en 1914 jam estis 3 000, kaj en 1930, pliaj mil estis aldonitaj.

En la jaroj 1919–1921, la fabriko estis transformita en moderne ekipitan instalaĵon inkluzivantan altajn kaj aerplenajn mekanikajn atelierojn, presejon, ekspedejon, laboratorion kaj esplor- kaj evoluigsekcion fokusitan pri iloj kaj ekipaĵoj uzataj en la

fabriko de Waldes mem. Ekde 1910, ekzistis propra telefoncentralo kaj ankaŭ, ekzemple, teleobjektiva fotilo uzata por sendi teknikajn desegnaĵojn.

Tiutempe, ĝi estis pintnivela solvo por dungitaj instalaĵoj: vestoŝanĝejoj por viroj kaj virinoj, kuraĉloko, biblioteko, sportejo, kaj malgranda parko kun benkoj kaj diversaj ekzercekipaĵoj ĉirkaŭ la fabriko. Waldes ankaŭ zorgis pri ilia loĝado kaj edukado. Li estis unu el la malmultaj dungantoj, kiuj ne maldungis eĉ unu personon dum la granda

monda depresio de la 1930-aj jaroj. Ne estis mirinde, ke homoj respektis lin. Fariĝi metilernanto ĉe la firmao de Waldes estis privilegio, ĉar ĉiuj interesiĝis pri tiaj laboristoj. Krome, ĉiu diplomiĝinto de la loka metilernadlernejo ricevis ŝparlibron kun financa sumo, faciligante por li/ŝi eniri la vivon. Heinrich Waldes ĉerpis sperton pri administrado de la firmao de tiaj entreprenistoj kiel la usonano Henry Ford (*1863 – †1947), kiu, interalie, enkondukis kvintagan, 40-horan laborsemajnon.

Kun la modernigo de la fabriko, ankaŭ la ritmo de produktado pliiĝis, ĉefe danke al la

konstante pliboniĝantaj specialaj maŝinoj kaj iloj, kiujn la firmao mem desegnis kaj fabrikis kaj kiuj, el teknika vidpunkto, metis ĝin en la avangardon de fabrikantoj de malpezaj metalaj produktoj. La moderna dezajno de ĉi tiuj aŭtomataj maŝinoj ankaŭ estas evidentiĝita per la fakto, ke, post kelkaj malgrandaj modifoj, kiuj ne ŝanĝis iliajn bazajn parametrojn, ili ankoraŭ plenumas la postulojn de la hodiaŭa tre postulema produktado. La samo validas por kelkaj sinsekvaj iloj, kiuj laboras kun preciza sinsekvo de individuaj teknologiaj elementoj. Ilia dezajno ne estis superita de la evoluo de multaj jardekoj.

Heinrich Waldes nomis laagrafon KOH-I-NOOR – laŭ tio, kio laŭdire estas la plej granda kaj plej fama hinda diamanto en la mondo, pezanta 186 karatojn. Ĝi estis trovita en Hindio kaj transprenita de la britoj dum ilia regado. En 1849, ili donacis ĝin al sia reĝino Viktorio (1819–1901). Laŭ legendo, ĉi tiu gemo estis enmetita en la okulon de antikva hinda dio. Kiam la persaj konkerintoj de Hindio unue vidis la ŝtonon brili en la suno, ili ekkriis "KOH-I-NOOR", kio signifas "monto de lumo".

La nomado de la prembutono estis unu el la grandaj administraj kaj strategiaj movoj de Waldes. La bildo de la prembutonoj kun la literoj K-I-N reliefigitaj sur ili estis uzata kiel komerca emblemo, per kiu la kompanio ekspansiigis al eksterlandaj merkatoj – filioj estis fonditaj en Dresdeno (1904), Varsovio (1908), Parizo (1911) kaj Novjorko (1912). Estis por la reklama kampanjo en Usono, ke la mondfama firmao emblemo "MISS KIN" estis kreita – bildo de knabino kun butono

KOH-I-NOOR plantita anstataŭ okulo. Oni diras, ke la emblemo estis inventita sur ŝipo survoje al Ameriko, kiam unu el la pasaĝeroj, ŝerce, metis pligrandigitan butonon uzatan por reklamado sur la okulon de juna vojaĝantino anstataŭ monoklo. Por Waldes, ĉi tiu ŝerco estis sparko de inspiro, li fotis la knabinon, kaj liaj amikoj – la ĉeĥa pentristo František Kupka (1871–1957) kaj la ĉeĥa grafikisto Vojtěch (Adalbert) Preissig (1873–1944), kreis la novan emblemon de MISS KIN:



Miss KIN
(aŭtoro V. Preissig)



Miss KIN ankaŭ KIN GIRL
(pentristo F. Kupka)



Komerca emblemo de la kompanio Waldes



Praga tramo kun reklamo Koh-i-noor en 1913.



La londona vendejo de Waldes & Co.



Koh-i-noor Waldes vendejo en Parizo, Rue de St. Denis, 1920-aj jaroj.

Arjaniĝo kaj la morto

La plia prosperado de la firmao Waldes estis interrompita de la germana okupado en 1939. La fabriko estis arjanigita kaj renomita al KOH-I-NOOR, duonjaron post la komenco de la okupado, la posedanto Heinrich Waldes estis arestita de la Gestapo pro sia juda deveno kaj finis en la germanaj koncentrejoj Dachau kaj Buchenwald.

En 1941, lia familio, kiu sukcesis elmigri al Usono, pagis por li ok milionojn da kronoj, sed bedaŭrinde ili ne savis lin. Li mortis la 1-an de julio 1941.

Unu versio pri lia morto estas, ke germana kuracisto akompanis lin sur la ŝipo al Havano (Waldes estis diabetulo). Li supozeble donis al li injekton, post kio li mortis en Havano. La

dua versio deklaras, ke li mortis tie pro akuta nefrito.

La sola pozitiva afero pri lia morto estis la fakto, ke li ne ĝisvivis la komunisman ŝtatigon de sia fabriko en 1946 en Ĉeĥoslovakio, kio certe forte vundus lin mense kaj fizike.

Kiel funkcias prembutonoj?

Prembutonoj ja troviĝas ankaŭ en la komerca emblemo de KOH-I-NOOR kaj konsistas evidente el du partoj, kiuj kuniĝas kaj formas solidan ligan per klakado.

Por kunigi du pecojn de ŝtofo, vi devas alkroĉi la respondan parton de la prembutono al ĉiu peco de ŝtofo. Iuj prembutonoj povas esti alkudritaj sur la ŝtofon, sed la tiel nomataj nitoj aŭ nitbutonoj estas alkroĉitaj per specialaj nitiloj.



Tomba monumento de Heinrich Waldes en juda tombejo en Prago.



Tomba monumento de Eduard Merzinger. Malnova katolika tombejo, Dresdeno, Saksio, Germanio.

Aviadila vojaĝo

de Lasse Granat



Katmanduo–Kalkato dum fulmotondro

Mi spertis kelkajn gravajn ŝtormojn dum kelkaj flugoj, kie la aviadiloj tremas kaj ĉiuj estas petitaj alkroĉi siajn sekurzonojn, eĉ la stevaroj.

Sed unu vojaĝo estis pli malbona ol aliaj. Dum malfrua vespera foriro de Katmanduo al Kalkato, estis averto, ke fulmotondro baldaŭ

aperos pli proksime al Hindio, sed la respondeculoj decidis, ke la flugo verŝajne estos bona.

Post iom da tempo ĝi komenciĝis. La aviadilo tremis kaj kliniĝis, oni ne ĉiam estis certa ĉu la tegmento estis supre. Sakoj komencis fali el la valizobretoj kaj sur la homojn sube, multaj komencis krei kaj kriegi, kelkaj falis

dum ili provis ordigi falintajn sakojn, kelkaj vundiĝis kiam ili falis.

Plejparto el ili estis hindioj aŭ nepalanoj, do ili estis iom pli malhelaj laŭ haŭtuanco, sed la sangaj vizaĝoj kaj manoj de kriantaj homoj ankoraŭ estis klare videblaj. Estis bizara sperto, mi mem sidis apud fenestro, do min maltrafis la flugantaj sakoj, sed mi ricevis mirindan vidon de la fulmanta nokta ĉielo super Himalajo.

Iom post iom trankviliĝis kaj kiam ni alteriĝis en Kalkato, multaj rapidis forlasi la aviadilon.

Borensberg de supre

Dum kelkaj jaroj mi laboris pri komputila projekto por testi la elektran sistemon en batalaviadilo. Mi ofte pasigis kelkajn tagojn ĉe SAAB en Linköping, kie ni starigis nian komputilan sistemon kune kun kompleta elektra kopio de la koncerna aviadilo.

Multaj el la homoj, kiuj laboris tie, kompreneble interesiĝis pri aviado.

Unu el ili havis ordinaran privatan aviadilon parkitan ĉe la propra flughaveno de SAAB, proksime de nia hangaro. Li kelkfoje demandis, ĉu iu volas aliĝi al li por eta tagmanĝa veturo, kaj kompreneble mi konsentis.

Iam ni flugis laŭlonge de la Göta-kanalo. Li montris al kelkaj kluzoj, kiuj estis iom specialaj, kaj demandis al mi, ĉu mi vidas la strangan kluzpordegon. "Ne", mi respondis kompreneble. Poste li direktis la aviadilon vertikale al la kluzo. "Ĉu vi vidas ĝin nun?" li demandis. Kompreneble mi ne vidis ĝin, ĉar dum tia plongo estis troa sangopremo en la cerbo kaj mi vidis nur ruĝon, kion mi diris al li. "Ho, vi ricevis 'ruĝan senkonsciiĝon'", li diris. "Jes, ĝi estas la malo de 'senkonsciiĝo' kiam oni grimpas krute supren", li klarigis.

Ĝi estis interesa sperto.

Malpli drama sperto kun subitaj ŝanĝoj en alteco estis flugado en ŝanĝiĝanta suna pejzaĝo.

En Ostrogotio estas kaj densaj arbaroj kaj grandaj agrikulturaj kampoj. Kiam oni flugas malgrandan privatan aviadilon super malhela picearbaro kaj elfugas super suna kampo, la aviadilo estas levita supren kvazaŭ per malgranda kruta suprenira deklivo, kaj poste subite sinkas kiam oni revenas super la malhela arbaro. Malkomforte por tiuj, kiuj ne kutimis al ĝi, sed tute normale por aliaj!

Problemsolva flugvojo en Amsterdamo

Kiam mi laboris en Aachen en okcidenta Germanio, mi ofte flugis hejmen en kelkaj malgrandaj "saltoj" tra, ekzemple, Kolonjo, Hamburgo kaj Kopenhago. Iam io okazis malĝuste sur la itinero Kolonjo–Hamburgo, do oni diris al mi en Kolonjo anstataŭe iri al Amsterdamo, kie mi ĝustatempe kaptos Finnair-aviadilon rekte al Gotenburgo, kaj tiel okazis. Mi uzis tiun itineron plurfoje de tiam.

Alifoj, mi kaj kolego estis en Londono kaj maltrafis la Gotenburgo-aviadilon ĉe Heathrow. Oni diris, ke estos malfrue en la nokto antaŭ ol la sekva ŝanco venos. Tiam mi rememoris la Finnair-aviadilon kaj diris, ke se ni povus iri al Schiphol en Amsterdamo, ni simple atingus la Finnair-aviadilon al Gotenburgo. Ili kontrolis la horarojn kaj disponeblajn sidlokojn kaj diris, ke "tio estis bona konsileto", kaj tial ni alvenis hejmen nur iomete malfrue.

Flugantaj sakoj ĉe Ŝiphol

Mi iam flugis per malgranda pasaĝeraviadilo de Kolonjo al Amsterdamo kaj de tie al Gotenburgo. Ĝi estis tre malgranda aviadilo, kiu ne havis kargospacon sub la pasaĝerkabino kiel plej multaj aviadiloj havas, sed enfermitan spacon inter la pasaĝerkabino kaj la pilotoj. Kiam ni alteriĝis ĉe Ŝiphol, ni

devis resti en la aviadilo dum ili malŝarĝis la tutan bagaĝon.

Estis ekscite sidi kaj rigardi. Kelkaj ĉaroj staris apud la aviadilo, ŝajne destinitaj por ricevi bagaĝon por diversaj cellokoj. Viro staris interne de la kargokabino kaj prenis sakojn, kiujn li transdonis al iu staranta en la pordo fronte al la ĉaroj. La viro demandis pri ĉiu sako: "Kien iras ĉi tiu diabla sako?", ricevis respondon kaj ĵetis ĝin al la ĝusta ĉaro. Sakrado pluvis. "Fek! Kien iras ĉi tiu merda

pakaĵo?", "Kien diable iras ĉi tiu infera dorsosako?".

La bagaĝo ricevis sian propran flugon. Kiam mi alvenis en Gotenburgon, mi longe staris ĉe la bagaĝreponejo atendente mian valizon. Fine, la tuta bagaĝo alvenis. Krom mia valizo. Mi raportis la eraron kaj iris al la laboro, estis frue en la tago. Kiam mi revenis hejmen vespere, mia valizo jam estis hejme, ĝi estis en Oslo por ekstra vojaĝo kaj ne havis tro multajn difektojn.

bLINKEN

Artaĵo aŭ ne, jen la demando, la nomo bLINKEN !

de Ingegerd Granat

Tra la tempo kaj ĉie, diversaj artaĵoj estis starigitaj kaj montrataj. Ĉio ekde la Mona Lisa ĝis la fekaĵarto sur Götaplatsen en Gotenburgo. Ĉi tiu lasta artaĵo, "Stako da Ligno kaj Fekaĵo", estis tre kritikita.

Kaj kion pensu prudenta Gotenburgano, kiel tio povis okazi? La respondo estas, ke ĝi okazis! Kaj nun la ondoj de diskuto akriĝas pri la pompaĉa artaĵo, kiu estis kunmetita kaj metita sub la fortikaĵo Skansen Lejonet. Por vere atentigi ĉiujn, la kolosa artaĵo estis pentrita en pompaĉa ĉerizroza koloro, kiu vere elstaras.

Oni diras, ke "bLINKEN" supozeble reprezentas grandan ŝtonblokon, kiu staras sur fervoja ponto de "Västlänken". Ĉiukaze, la nomo de la artistino estas Katharina Grosse,



kaj ŝi vere serioze entreprenis kaj havas kaj la Svedan Artan Konsilion kaj la Svedan Transportan Administracion je sia flanko.


Sed ni devas almenaŭ akcepti, ke ĉi tiu pompaĉa artaĵo, kiu aspektas pli kiel kolera papago de malproksime, estas parto de la *kronotopia* vizio, kie arto elstarigas rakontojn pri la pasinteco, nuntempo kaj estonteco de Gotenburgo. Kaj mi ne pensas, ke iu ajn

kritikisto forprenos ĉi tiun 25-tunan bLINKEN.

(La nomon bLINK oni povas kompreni kiel vortludan kunmeton de la vortoj palpebrumo, blink, kaj ligilo, *angle* link, aludante al la trafika projekto *Västlänken*, la okcidenta ligilo. – *Noto de la red.*)

Metodo solvi problemojn

Trovita de Jan Bondesson




1. Ĉu la aparato funkcias? Jes/Ne
2. Ne fingrumu
3. Ĉu vi ŝraŭbis ĝin?
4. Ĉu iu scias?
5. Kiel vi povas esti tiel d-e stulta?
6. Diru nenion

7. Vi kompatindulo
8. Ĉu vi ricevos riproĉon pro tio?
9. Ĉu vi povas kulpigi iun alian?
10. Ĵetu ĝin rubujen
11. La problemo solvita!

/Jan Bondesson

Nerveco

De A. Ĉeĥov.



Dmitri Osipoviĉ Vaksin, arĥitektisto, revenis el l' urbo en sian somerloĝejon sub freŝa impreso de seanco spiritisma. Devestiĝinte kaj kuŝiĝinta en sia izola ĉambro (sinjorino Vaksin forveturis Trojckon), li kontraŭvole rememoris ĉion ĵus aŭditan kaj viditan. Propradirite, tio ĉi ne estis seanco : Ia vespero pasis nur en parolado pri teruraj aĵoj. Ia fraŭlino senkaŭze ekparolis je divino pri pensoj. De tio ĉi oni transiris al rakontoj pri spiritoj. Poste oni nerimarkate ekparolis pri fantomoj kaj fine pri vivaj enterigitoj. Ia sinjoro rakontis pri mortinto, kiu returniĝis en sia ĉerko. Vaksin mem prenis pladon kaj montris al la fraŭlinoj, kiel oni devas paroli kun spiritoj. Li elvokis, inter aliaj, sian onklon Klaŭdion Mironiĉ, kiun li pense demandis : »Ĉu ne estas tempo transposedigi la domon al mia edzino? Kaj l' onklo respondis : »Ĉio estas bone, se ĝustatempe farata.»

— Estas multe da mistera kaj ... terura en la naturo — pensis Vaksin, tirante sur sin la litkovrilon. — Teruraj estas ne la mortintoj, sed tiu ĉi nescieco!

Eksonis l' unua horo de l' nokto. Vaksin turniĝis sur l' alian flankon kaj ekrigardis de sub la litkovrilo la bluan lumon de l' nokta lampo. La lumo ŝanceliĝis kaj apenaŭ klarigis la ŝranketon de la sanktfiguroj kaj la grandan

portreton de l' onklo Klaŭdio Mironiĉ, pendantan kontraŭ la lito.

— Kion mi faros, se en tiu ĉi duonlumo aperos la ombro de l' onklo ? — venis en la kapon de Vaksin. — Ne, tio ĉi estas neeble!



La fantomoj estas superstiĉo de malmaturaj cerboj, tamen Vaksin, malgraŭ tio ĉi, tiris sur la kapon la litkovrilon kaj forte malfermis l' okulojn. En lia imago prezentiĝis la mortinto, turniĝinta en la ĉerko, rememoriĝis la feliĉega onklino, aperis la kapo de pendiĝinta kolego, la figuro de droninta knabino ...

— Kia absurdo! ... Mi timas kvazaŭ mi estus infano ... Malsaĝe !

»Tik-tik-tik !» aŭdiĝis la horloĝo de l' muro. El la vilaĝa preĝejo alportiĝis la sonorado de l'

tombeja gardisto. La sonorado estis malrapida, treniĝa kaj kortranĉanta. Sur la nuko kaj dorso de Vaksin moviĝis malvarma formikaro. Al li ŝajnis ke post lia kapo iu malrapide spiras, kvazaŭ onklo eliris el la kadro kaj kliniĝis super la nevo ... Vaksin ektimis. Li kunmetis la dentojn kaj detenis la spiradon. Fine, kiam tra la malfermita fenestro enflugis skarabo, kiu ekzumis super lia lito, li ne povis plu teniĝi kaj forte ektiris la sonorileton.

— Demetri Osipoviĉ, *was wollen Sie?* aŭdiĝis post la pordo la voĉo de la guvernantino.

— Ha, tio ĉi estas vi, Rozalia Karlovna? ekĝojis Vaksin. — Kial vi vin maltrankviligas?... Ĉu Gavrilu ne povas veni?

— Gavrilon vi mem forpermesis en la urbon, kaj Glafira ankaŭ foriris ... Neniu estas en la domo ... *Was wollen Sie doch?*

— Mi, fraŭlino, mi volis diri ... vi ... Sed eniru, ne ĝenu vin! ... ĉe mi estas mallume ...

En la dormoĉambron eniris la dika kaj ruĝavanga Rozalia Karlovna kaj haltiĝis en atenda pozicio.

— Sidiĝu, fraŭlino ... Mi volas diri ... »Kion mi diros al ŝi?« — ekpensis Vaksin, malrekte rigardante la portreton de l' onklo kaj sentante ke li iom post iom trankviliĝas. — Mi propradirate volis vin peti ke se Gavrilu iros morgaŭ l' urbon, vi ne forgesu ordoni ke ... jes ... ke li aĉetu cigaretajn tubetojn ... Sed sidiĝu !

— Tubetojn? Bone ! ... *Was wollen Sie noch?*

— *Ich will* ... Mi nenion *will*, sed ... Sed sidiĝu! Mi ankoraŭ ion elpensos.

— Estas malkonvene al fraŭlino sidi en vira ĉambro. Mi vidas ke vi, Demetri Osipoviĉ, estas petolulo ... mokulo ... Mi komprenas ... Oni ne vekas por tubetoj ... mi komprenas.

Rozalia Karlovna turniĝis kaj eliris. Vaksin, iom trankviligita de l' interparolado kaj

hontante pro sia timeco, surtiris la litkovrilon sur la kapon kaj fermis l' okulojn. Ĉirkaŭ dek minutoj li sentis sin bone, sed poste rekomencis antaŭa absurdeco. Li kraĉis, prenis alumetojn kaj, ne malfermante okulojn, lumigis kandelon. Sed la lumo ne helpis. Al la tima imago de Vaksin ŝajnis ke iu rigardas de l' spegulo kaj ke l' onklo palpebrumas.

— Mi ree sonoros al ŝi — ke ŝin prenu la diablo ! — decidis li. — Mi diros ke mi estas malsana ... Mi demandas la boteleton de gutoj.



Vaksin sonoris. Nenia respondo. Li ree sonoris. Responde li aŭdis sonojn de l' tombejo. Kaptita de timo kaj sentante malvarmon, li rapidege elkuris el la ĉambro kaj farante krucosignojn kaj mallaŭdante sin pro sia malkuraĝo, li nudpiede kaj en suba vestaĵo alkuris al la ĉambro de l' guvernantino.

— Rozalia Karlovna! — diris li tremvoĉe, frapante la pordon. — Rozalia Karlovna ! ĉu vi dormas ? Mi . . . mi estas ... malsana ... gutojn !

Nenia respondo. Ĉirkaŭe regnas silento.

— Mi vin petas ... ĉu vi komprenas ? Mi petas! Al kio tiu ĉi ceremonieco, precipe se oni estas ... malsana ? Kiel vi estas »*zierlich-manierlich*«! En via aĝo ...

— Mi rakontos tion ĉi al via edzino ... Vi maltrankviligas honestan fraŭlinon ... Kiam mi estis ĉe barono Anzig, kaj la barono venis al mi por alumetoj, mi komprenis ... mi tuj ekkomprenis, kiajn alumetojn li volis kaj mi rakontis al la baronino ... Mi estas honesta fraŭlino !



— Al la diablo vian honestecon ! Mi estas malsana ... mi petas gutojn ! Vi komprenas? Mi estas malsana !

— Via edzino estas brava, honesta virino, kaj vi devas ŝin ami. Mi ne volas fariĝi ŝia malamikino.

— Malsaĝulino, jen kio vi estas! Ĉu vi komprenas — malsaĝulino !

Vaksin sin apogis al la fosto, krucigis la manojn kaj atendis la foriĝon de l' timo. Reiri en la ĉambron, kie lumtremis la lampeto kaj el la kadro rigardis la onklo, li ne havis forton, — sed stari en suba vestaĵo ĉe pordo de l' guvernantino estis maloportune en ĉiuj rilatoj. Kion fari ? La horloĝo eksonis du, kaj la timo nek foriĝis nek malgrandiĝis. La koridoro estis malluma kaj en ĉia angulo rigardis nigraĵo. Vaksin turniĝis kun la vizago al la fosto, sed tuj al li ekŝajnis ke iu facile tiris lian ĉemizon kaj tuŝis la ŝultron.

— Pesto kaj infero ! Rozalia Karlovna !

Nenia respondo. Vaksin maldecideme malfermis la pordon kaj enrigardis la ĉambron. La virtoplana germanino trankvile dormis. La malgranda lampo lumigis la reliefojn de ŝia plenpeza korpo, spirinta sanon. Vaksin eniris kaj sidiĝis sur la plektan keston apud la pordo. En alesto de kreitaĵo, kvankam dormanta, sed viva li sentis sin pli facile.

— Ŝi povas dormi, tiu ĉi germanino, — pensis li. — Mi iom sidos tie ĉi; ĉe l' mateniĝo mi eliros ... La mateno venas frue ...

Atendante la ĉielruĝon, Vaksin kuntiriĝis sur la kesto, subapogis la kapon sur la manon kaj enpensiĝis.

— Jen kio estas nerveco ! Homo klera, meditema, kaj tamen ... ha, diablo, mi hontegas.

Aŭdante la pacan kaj regulan spiron de Rozalia Karlovna li tute trankviliĝis ...

La sesan horon de mateno l' edzino de Vaksin revenis, kaj, ne trovinte l' edzon en la dormoĉambro, direktiĝis al la guvernantino kun intenco preni malgrandan monon por pagi la veturigiston. Kiam ŝi estis enirinta, ŝi ekvidis la sekvantan scenon: sur la lito dormis Rozalia Karlovna etendiĝinta en malordo pro la varmego, kaj en distanco de tri metroj, sur la kesto, ŝia edzo kuntiriĝinta kolubromaniere ronkis kiel sanktulo. Li estis nudpieda kaj en la suba vestaĵo. Kion diris l' edzino, kaj kiel malsaĝa estis la fizionomio de ŝia edzo post lia vekiĝo, mi lasas tion ĉi priskribi al aliaj. Mi, konfesante mian malpotencon, demetas l' armilon.

Tradukis

A. Kofman.

El Lingvo Internacia n-ro 6, 1901.